

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. – Redaktas Dr. Stan. Kamarýt

Okaze de la 21-a de decembro, kiam generalisimo Stalin atingas sian 71-an jaron, ni salutas lin kun arda amo kaj profunda respekto devontigante nin, ke ni ankoraŭ pli intense klopodos konvinki indiferentulojn en okcidentaj landoj, ke la unusolaj metodoj por konservi efektivan pacon estas tiuj starigitaj en la kongresoj de la Pacdefandantoj en Stockholm kaj Warszawa.

Centra Komitato de Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko:

Adolf Malík,
prezidanto.

Jar. Mařík,
ĝen. sekretario.

Maxim Gorkij o esperantu

(V souvislosti s jednáním o mezinárodním jazyku v Narkomprosu r. 1919.)

Konservativní mysl tvrdošijně dokazuje, že esperanto je utopistickým podnikáním. Živá, zákonitě se vyvíjející skutečnost bezespechu, ale stále rozhodněji poráží mínění konservativců.

Před čtyřiceti lety pokládala většina lidí elektrickou energii za kacířský výmysl a za hloupou utopii, před dvaceti lety považovali za utopii vzduchoplavbu. Telefon je také jedna z »utopií«, kterou lidský rozum uskutečnil, o telegrafii bez drátu hovořili rovněž jako o bláznovství.

Náš neúnavný rozum, klidící v boji s tajnými silami přírody vítězství za vítězstvím, se stává stále smělejší a předkládá k rozřešení stále více »utopistické« a stále »ztřeštěnější« plány a problémy.

Štředověké utopie o »filosofickém kameni« a o »elixíru života« jsou nyní zpracovávány v laboratořích největšími učiteli světa.

Nejlepší lidé Ruska se snaží uskutečnit nejnesmyslnější »utopii« — zavedení sociální spravedlnosti ve světě a jistě není možno říci, že by jejich úsilí bylo neúspěšné.

Kulturní dějiny nám výmluvně vyprávějí, že se nejdůležitějším vůdcům člověčenstva podařilo uskutečnit nemálo »nesmyslných utopií« a stále častěji se tyto nesmysly obrazivosti mění v pracovní hypotезy vědy.

K uskutečnění utopií se nyní sjednocuje mnoho tisíců a milionů lidí... a nyní je jediný, mezinárodní jazyk lidstva potřebnější než kdykoliv dříve.

Nepostrádatelnost jediného jazyka pro mezinárodní proletariát je podmíněna stejností třídních požadavků a cílů proletariátu.

Esperanto je podle mého mínění zdravý a k dalšímu vývoji úplně způsobilý zárodek mezinárodního jazyka. Již

nyní má esperanto dosti rozsáhlou literaturu a nadmíru úspěšně se vyvíjí theoreticky. Tato práce půjde mnohem úspěšněji a rychleji kupředu, přiberou-li se k ní učení filologové, a to ti z nich, kdo jsou přesvědčeni o potřebě sjednotit lidstvo.

Říká se: »Jazyk se nevyvíjí uměle.«

Já nejsem esperantista, — ale vím, že se tento umělý jazyk vyvíjí dosti rychle a že se stává naprosto přirozeným zjevem, neboť odpovídá potřebě najít a utvořit pro lidstvo dnešní doby jazyk všem srozumitelný.

Roku 1910 projel můj přítel Alexej Semenovič Jakutskij celou Evropu. Neznal ani jediný evropský jazyk a hovořil jen esperantem. Učinil to proto, aby se osobně přesvědčil o stupni rozšíření »umělého« jazyka. Skoro v každém, více nebo méně významném městě Evropy našel esperantistickou skupinu.

Jsem pevně přesvědčen o tom, že organizovaná vůle mas je plně s to přetvořit věc »umělou« ve skutečnou.

Copak není veškerá naše kultura jevem »umělým«?


Dočkali jsme se dob, kdy nekulturní člověk připadá nepřátelským našim snahám, překážkou pro další růst kultury.

V zájmu vítězství kultury děláme revoluci, plýtváme všemi silami svého rozumu, své vůle, obětujeme svou osobní svobodu, svůj život.

Je možno popřít, že jazyk, jenž bude jediným pro všechny, nedá mocný popud kulturnímu rozvoji?

To je nemožné. A proto je třeba uznat utvoření a rozvoj takového jazyka za naprosto potřebné.

Z ruského přeložil O. Ginz.



Voĉoj el malproksimo.

Valda Vinaŝ tradukis poemojn kaj kantojn de primitivaj popoloj kaj kunigis ilin sub la supra titolo. Ili estas destinitaj al teatra prezentado precipe sur estrado. La unua prezentado okazis la 28-an de junio en Hradec Králové fare de kolektivo gvidata de la aŭtoro kaj de Eva Suchardová akompanate de piano-muziko komponita kaj ludita de prof. Dana Motlová kaj kun projekciataj bildoj desegnitaj de E. Suchardová. La arto de koloniaj popoloj estas unu el iliaj armiloj en batalo kontraŭ imperialista subpremo. Tial ni publikigas kvar specimenojn de tiuj poemoj kun akompanaj bildoj kredante, ke ankaŭ per tiu ĉi maniero ni konfesas nian solidarecon kun batalo de la koloniaj nacioj por libereco kaj por starigo de efektiva paco.

Potenca voĉo (Norda Ameriko).

La voĉo, pro kiu la lando beliĝas.
La voĉo jen supre,
la voĉo de tondro
en la malhelaj nuboj
ree kaj ree elsonas —
la voĉo pro kiu la lando beliĝas.

La voĉo, pro kiu la lando beliĝas.
La voĉo jen supre,
la voĉo de grilo
en herbaro kaj floroj
denove, denove sonas —
la voĉo pro kiu la lando beliĝas.

Pri la homa nenieco (Orienta Afriko).

Kiam dio pratempe kreadis aĵojn,
li kreis la sunon:
kaj ĝi venas, foriras, kaj tamen revenas.
Li kreis la lunon:
Kaj ĝi venas, foriras, kaj tamen revenas.
Li kreis la homon:
jen kiu venas, foritas, kaj ne plu revenas.
La tombo profundas,
ni homoj tie finiĝas.

Mortonta junulino (Hindonezio).

Ho patrino,
postkiam mi mortas,
glatkambu mian hararon
kaj plektu ĝin.

Vestante min, patrino,
prenu ŝvelmolan veston, patrino,
kaj tolon el Sumarango!

Virina horkanto por militantoj. (Orienta Afriko.)

Dio, dio,
rompu
fortecon de l'malamiko!
Rompu, rompu
fortecon de l'malamiko!
Junulinoj, ne mutu!
Ni preĝas al dio:
rompu, rompu
fortecon de l'malamiko.
Vi stelo matena
kaj vi vesperstelo:
rompu fortecon de l'malamiko.
Vi nuboj de l'neĝmontaroj:
rompu fortecon de l'malamiko.
Vi, kiu atendas la ĉielreĝinon:
rompu, rompu, rompu
fortecon de l'malamiko.

Fráňa Šrámek: Amanto en aprilo.

Mi vin elpetis de tondro unua. Mir' -
belan donacon, teksitan el mia sopir'.

Vera, nevera, dono espera,
nova tempesto kvazaŭ forporti vin povas,
vestojn mi prenas, korpon ne trovas,
via rev' restas por mi mistera.

Pri mia rev' mi iam flustras. Ĉiu suflor'
kvazaŭ beleta ringet' fandita el or',
ilin surprenas vi, lasas el man',
kiam vi dankas min, ne estas voĉ, nur ĝia ŝajn'.

Post via ekdormo, mutiĝo nokt-hora,
mi metos spegulon al via buŝ' fremda kaj fora,
ekkonos mi eble laŭ formo de via elspir'
vian amaton, teksitan el via sopir'.

El la ĉeĥa Rud. Hromada. tradukis d-ro T. Pumr.)

Popolaj kantoj en Esperanto-adapto.

(Tancuj, tancuj, vykrúčaj.)

Dancu, dancu, movu vin,
preter forno ŝovu vin.
Ĉe malvarmo multe pli
ol kusenoj servos ĝi.
Tralalala...

Ĉe kazerno gardis mi,
truan jakon havis mi.
Nokta pluvo rosis min,
ĝis mateno frostis min.
Tralalala...

(Por svedia rondvojaĝo de Infana Radioĥoro Kulínský

tradukis d-ro T. Pumr.)

KRONIKO ENLANDA

Sudvietmana Esperanto-Asocio salutis nian Asocion per letero el 19-a de majo 1950 atinginta nin la 15-an de novembro. Ni represas tiun kortuŝan kaj kuraĝigan leteron: »De pli ol dek jaroj ni ne povas korespondi kun eksterlando kaj preskaŭ ignoras pri tio, kio okazis en nia tutmonda movado. Kiam la dua mondmilito ĉesis, ni klopodis kontakti kun alilandanoj sed ne sukcesis. Ekplodis nia Nacia Revolucio (19, 8, 1945), per kiu ni nin liberigas el Japana kaj Franca jugoj. De kvin jaroj ni ĉiuj partoprenas en Rezistanta Batalo por defendi nian Respublikon kaj sendependecon. Kvankam mankas al ni ĉio, precipe eksterlandaj rilatoj, ni regrupiĝas en rondeto kaj ni okupiĝas pri propagando de nia lingvo batalante kontraŭ la franca imperialismo. Ni sukcesis starigi perkorespondan kurson en Nam-bo (Suda Vietnamo) kun pli ol cento da gelnantoj en 1949. Ni ne povas akceli nian propagandon kaj disvastigi grandskale, ĉar mankas eksterlandaj propagandoj pruvantaj, ke nia kara lingvo estas mondscale uzata precipe en servo de naciliberiga kaj popoldemokrata movado. Ni alvokas al ĉiuj subtenĝi nin, kiel vi jam faris por la hispanaj, ĉinaj, grekaj kontraŭ-faŝistoj. Amase bombardu nin per E-gazetoj, poŝtkartoj, salutleteroj, ilustritaj naciaj revuoj, progresemaĵoj anglalingvaĵoj kaj franclingvaĵoj. Kiuj estas por ni valoraj donacoj kaj celtrafaj okulfrapaj propagandiloj.

Karaj samideanoj! Estos vera surprizo, se nia letero atingos vin, ĉar ni estas en liberaj regionoj, kiuj estas ĉirkaŭitaj de malamikaj postenoj. Ĉi letero, vojaĝinte tra maro, montoj, arbaroj, senhomaj regionoj, de francaj koloniistoj turmentitaj kaj rabitaj vilaĝoj, alportas al vi ĉiuj, foraj samlingvanoj la elkorajn salutojn de Vietnamaj esperantistoj, kiuj senlace batalas por defendi la junan popoldemokratian Vietnaman Respublikon klarvide gvidatan de la prezidento Ho-Chi-Minh. Vivu la solidareco de tutmonda popoldemokrata esperantistaro!

Ricevo de tiu letero estas por ni sperto edifanta. Ĝi estas konvinka pruvo, ke la pactendaro vivas kaj viglas tra la tuta mondo. Ekzisto de esperantistaj rondoj en nacioj batalantaj kontraŭ imperialista subpremo por sia libereco konvinkas ĉiun pri kresko de la pacfortoj en la mondo. Nia Centra Komitato konfirmis tiun leteron kaj ni tre petas niajn membrojn amase skribi al la Vietnamaj amikoj laŭ la adreso: Revuo Thong-Nhut-Nambbo, c/o Mr Nguyen duc Quy, Vietnam Representative 122 Sathorn Road, Bangkok, Thailand.

Tutŝtata poŝtmarka ekspozicio okazis en Praha 28 X.—5. XI. kun Esperanto-fako. Granda tabulo kun ĉeĥa teksto kaj verda stelo emfazis la signifon de E.: »Propagandanto de filatelo kaj de internaciaj filatelistaj rilatoj - Esperanto.« En kolektoj de ĉeokazaj poŝtstampoj kun esp. teksto ni vidis ankaŭ du el Hungario. Oni disdonis multajn flugfoliojn »E. sur la poŝtvaloraĵoj«. La esp. ekspozicieto plaĉis kaj sekve la ekspozicia komitato petis la Asocion prunti ĝin al plua ekspozicio en Gottwaldov. (jm.)

Esperanto-stando en Brno. — De la 23. 9. ĝis la 8. 10. okazis en Brno fama Brna ekspozicia foiro, kiu sukcesis allogi 220.000 homojn. La foiro estas grava entrepreno ne nur el vidpunkto ekonomia, sed ankaŭ kultura. Tial la klubo decidiĝis partopreni por atentigi denove la publikon pri Esperanto kaj ĝiaj valoroj. Estis disponigita areo de 16 kvadrataj metroj, sur kiu oni ekspoziciis la plej reprezentajn librojn de nia literaturo, la plej allogajn gazetojn kaj prospektojn. Kaj mallongaj efikaj frazoj plu informis kaj ĉion kompletigis. Ĉio tre bone impresis, la tuto estis bele arkitekto solvita laŭ aranĝo, tekstoj kaj koloroj, nia ekspozicio versimile apartenis al la plej efikaĵoj tiuspecaj ekspozicioj. (J. V.)

Kultura Revuo eldonata de Komisiitejo por informoj kaj klerigo (IV-a sekcio) en Bratislava post kelkmonata paŭzo denove aperis en novembro kaj aperados duonmonate. La unua numero ampleksas 38 bele ciklostilitajn paĝojn. Krom multaj informoj pri kulturaj temoj kaj aktualaj (Slovaka kaj Hungara Akademioj eldonas kunlabore detalan vortaron slovaka-hungaran kaj hungara-slovakajn kun 45 mil vortoj) enestas specimeno el la nova romano de Dominik Tatarka »La unua kaj dua sturmo«. En la dua numero, el 1-a de nov., precipe leginda estas artikolo pri J. Fändli kaj specimeno el unu lia libro. Ni informas kun ĝojo kaj fiero pri tiu ĉi faro de slovaka aŭtoritatoj. Adreso de la redakcio: Októbrové nám. 12, Bratislava.

Lektorato de Esperanto ĉe Alta Komerca Lernejo en Bratislava (lektoro Paŭlo Rosa) havas en vintra semestro 1950/51 7 studantojn. Tio estas pli ol havas en tiu ĉi semestro lektoratoj rumana, itala, hispana, franca.

Ekzamena komisiono kunsidis la 5-an de novembro en Hradec Králové por ekzameni 1 kandidato de ekzameno unuagrada kaj 4 kandidatojn de la duagrada. La ekzamena senato konsistis el Dr. Stan. Kamarýt prezidanta, Rudolf Hromada kaj Josef Vondroušek.

Diplomon pri scio ricevis Rudolf Majdčinský, studanto de Industria lernejo en Duchcov.

Diplomojn pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis:

Miloš Hlaváček, oficisto en Hradec Králové (hejma tasko: Batalo por la paco).

Bohumil Novotný, komercisto en Liberec (Nunaj eblecoj uzi Esperanton por komercaj celoj).

Frant. Schwarz, fandista maistro en uzino en Hradec Králové (Ekzemploj pri uzado de akuzativo).

Marie Valešová, oficistino en Liberec (El historio de l'skoltismo).

Ĉiuj ekzamenitoj akceptu krom la aratulo pro la sukceso nian dankon pro ilia sindediĉo al lingvaj studoj.

Ĉehlingvan artikolon »Esperanto kaj Stalina instruo pri lingvistiko« de Jiří Kořínek aperigis nia Gazetara servo ciklostilite. Ĝi estas ie dispono de membroj, kiuj bezonas ĝin por refuti argumentojn de tiuj, kiuj ne konsentas kun nia klopodado.

Inter 2000 delegitoj el 81 landoj partoprenis la II-an Universalan Kongreson de Pacodefendantoj en Varsovio ankaŭ esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Brazilo, Nederlando, Italio, Islando kaj Danlando. Islanda samideano Torberge parolis al la kongreso en Esperanto, kion raportis ĉiuj tagjurnaloj en Pollando. Flugante tra Praha la delegitoj estis akceptitaj de esperantlingva oficisto de la Informministerio. EACSR sendis saluttelegramon al la kongreso kaj telegrafis al la Asocio de Esp-istoj en Pollando la nomojn de la delegitoj. (jm)

Frant. Slavík kvindekjara, la 11. VIII. 1950. Ni uzas tiun okazon por diri en la lasta numero tiujara al multaj, kiuj ne scias tion, ke li estas unu el la plej laboremaj niaj priorganizaĵoj laborantoj. Depost j. 1928 li partoprenis aktive en ĉiuj gravaj administraj taskoj kaj estas lia merito, ke nia Asocio povis travivi ĉiujn siajn krizojn. Ankaŭ post la liberigo ni malfacile estus sukcesintaj restarigi nian organizon tiom rapide sen lia helpo. Ni danku lin pro tiuj sindediĉoj kaj oferemo en fino de la jaro, en kiu li renkontis Abrahamon.

Lektorato de Esperanto en Teknika Altlernejo en Praha (fakultato de Specialaj sciencoj) havas en vintra duonjaro 1950/51 tri studantojn. Lektoro estas Ph. Dr. Aug. Pitlík.

Ni rekomendas al niaj legantoj legi ĉiam tiun ĉi rubrikon atente. Ni klopodas kunigi en ĝi ĉion, pri kio esperantista gazetaro skribas. Ni preferas por tio metodon de citado, por ke la leganto havu eblon mem prifuĝi gravecon de la afero, pri kiu oni raportas. Hodiaŭ ni komencas per raportetoj pri internaciaj kunvenoj dum la pasinta somero. Ili estis tre multaj. Pri la du kongresoj en Parizo kaj Torino ni jam raportis. Pri la naciaj kongresoj ni ne povas raportiti pri ĉiuj, ĉar ili estas tro multaj kaj ilia programo tro kutima. Sed ni volas atentigi ankoraŭ ke dum tiu ĉi somero denove ĉirkaŭ dek mil esperantistoj estis survoje. Krom tiuj lokoj, pri kiuj ni raportas en apartaj alineoj, kunvenis samideanoj diversnaciaj en La Rochelle, Ostende, Spa, Esbjerg, Norrköping, Wien, Mainz, Le Havre, Nottingham, Troon, Hodmezövásárhely, Letchworth (Usono), Hälsingborg, Aggersborg, Lofthus, Häbernbad, Arnhem, Havelte, St. Germain en Laye, Naantali, Jokohama ktp. Kaj Theo Jung daŭrigas en Heroldo de Esperanto la 16-an de oktobro:

»Eĉ la fabelo, ke mankas la nova Esperanto-generacio, ke nia movado konsistas nur el maljunuloj post kies forpaso nia tuta afero formortos, estas refutata de la faktoj. Ĉie inter la maljunuloj kaj malnovuloj, el kiu multaj distingiĝas per ankoraŭ mirinde freŝa energio, troviĝas ankaŭ novaj kaj pli junaj gesamideanoj.«

La sesa Internacia junular-kunveno de Tutmonda Junular-Organizo (TJO) en Konstanz la 28. jul. — 4. aŭg. kunvenigis 420 gejunulojn el 17 landoj. Tio mem estas rimarkinda sukceso. Ne kunvenis infanoj. La plej junaj estis 16-jaraj, la plej maljuna 30-jara. Inter ili estis 80 el Germanujo, 90 geinstruistoj. Ĉefurbestro Knapp salutis la kunvenon esperantlinave. la franca Alta Komisaro donis subvencion de 1000 GM Kvar naciaj delegitaroj (nederlanda, germana, brita kaj franca) prezentis apartajn programojn tutvesperajn. Laborkunsido akceptis porpacan rezolucion, kiu estis ankaŭ sendita al UNO. Cefa organizinto estis Michel Schmidt, kiu ĉus fininte la abituriantan ekzamenon dediĉis siajn tagojn al la TJO-kunveno (laŭ La Juna vivo kaj La Ponto el septembro).

Renkonto en Angers (Francujo) kunvenigis pli ol 100 esperantistojn el 12 nacioj, la 28-an de julio ĝis la 4-a de aŭg. Regis la konata Angersa intima kaj amika atmosfero. Granda parto de ĉeestantoj estis geinstruistoj.

Internacia Federacio Fervoja Esperantista okazigis sian 2-an kongreson en Salzburg, la 17—21-an de majo. Ĉeestis 400 kongresanoj el 10 landoj. Estis elektita komitato por kompilado de fervoja terminaro: Roshier Anglujo, Řebíček Ĉeĥoslovakio, Lienhardt Francujo, Hell kaj Pape Germanujo.

Internacia Katolika Esperanto-Kongreso en Romo la 10—17-an de aŭgusto kunvenigis 200 partoprenantojn el 17 nacioj. La kongreso estis inaŭgurita sur la Kapitulo, alparolis ĝin inter aliaj vicĉefurbestro kaj pastro Modesto Caroli. La kongresanoj partoprenis en granda publika aŭdienco ĉe la papo la 16-an de aŭg. en la Petrokatedralo. La papo Pius XII. diris en sia alparolo apartajn salutajn vortojn al esperantistoj. (laŭ Semisto, informilo de la Katolika Esperanto-Centro en Germanujo, en Munkeno, Postamt 13, Abhofach, el septembro.)

Arkeologia tendaro en Danlando por studentoj-esperantistoj organizita de la Dana Internacia Studentkomitato en Aggersund kunvenigis 2 svedojn, 1 norvegon, 1 anglon, 2 jugoslavianojn, 1 germanon, 5 danojn. La laboroj daŭris de 29 junio ĝis 14 julio 1950 kaj ilia tasko estis elfosadi malnovan vikingan kastelon el la 10-a jarcento, kiu estis trovita antaŭ kelkaj jaroj. La studentoj forskrapadis unu tavolon post la alia en malgranda areo, kie oni suspektis vikingajn domojn, kaj poste atente traserĉadis la forskrapitan teron por trovi ceramikaĵojn, poterojn, ostojn, najlojn ktp. La trovaĵoj estis tre multaj, la esperantistaj

arkeologio-studentoj trovis milojn da aĵoj. Nacia Muzeo en Kopenhago, sub bies gvidado la praktika laboro estis farata, ekzamenadis ĉion kaj rekonstruis multajn potojn kaj aliajn trovaĵojn. Post la du laboremajnoj sekvis unusemerna ekskurso al Kopenhago. La tendaro estis komplete pagita de la Dana Internacia Studentkomitato subvenciate de la dana registaro. (laŭ K. Schlüter en La Ponto, oktobro 1950.)

»Tra la Mondo kaj Literaturo« estas ciklostilita organo »eldonata por gelnantoj de Esperanto« de Stan. Roman en Warszawa, ul. Marszałkowska 81/32. Numero 7/8 el jul.—aŭg., kiun ni vidis, enhavas 14 paĝojn maŝine skribitajn, kun parto el traduko de Sinjoro Tadeo kaj tradukoj de poemoj el Stowacki, Malczewski, Wolski, Zmichowska, Dalman, Lemartowicz, Konopnicka, Tetmajer, Brodziński, Opman. Sub titoloj de la poemoj estas donitaj komencaj versoj pollingve. Pollingva enkonduka artikolo emfazas la fakton, ke tiom multaj altkvalitaj poemoj polaj estis tradukitaj, kio pruvas la altajn kvalitojn de polaj esperantistoj antaŭ la milito; ĝi estu instigo por junaj samideanoj aliĝantaj al la movado nun. Ni tre ĝojas, ke ni povas enskribi tie ĉi novan dokumenton pri esperantista vivo en popoldemokratia Pollando.

Traduko de la fino el la lasta ĉapitro de »Vivo kaj verko de komponisto Foltyn« de Karel Čapek sub titolo »Pri kreado« fare de Adolf Staňura aperis en Malgranda Revuo, n-ro 2/50.

Kvin poemoj originalaj de Reto Rossetti, John S. Dinwoodie, John Francis, William Auld, Tom Fraser plenigas unu paĝon en febr. numero de »Esperanto en Skotlando, oficiala Bulteno de la Skota Federacio E.« (23 Ashdale Drive, Mossbank, Glasgow, S. W. 2). Ni enskribas tion por dokumenti, ke ankaŭ, dum Literatura Mondo kaj Internacia Kulturo silentas, tamen la poezio vivas.

Esperanto en Popola Demokrata Germana Respubliko. Poŝta kaj Telegrafa Ministerio en Berlino komunikis, ke Esperanto ree estas permesata en la en- kaj eksterlanda poŝta trafiko (La Ponto, septem. 1950).

En Germanujo (okcidentaj zonoj) aperas krom La Ponto nun ankoraŭ Esperanto-Post en E-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei Limburg/L. Postfach 39, kaj Esperanto-Kurier eldonata de Esperanto-Gesellschaft, Offenbach (16), Alicestr. 44.

Filatelio »Pravda« (en Bratislava, poŝt. prieĥr. 316) eldonis filatelistan katalogon de poŝtmarkoj aŭstriaĵ (Katalog známok. Rakúsko 1918—1950) broŝuron de 24 paĝoj, sur kies kovrilo estas granda bildo de la Aŭstria Esperanto-poŝtmarko.

La Vokanto, intelekta broŝuro, responda redaktoro Šalom Zamir (16 Elhanan str. Tel-Aviv, Izraelo) estas broŝuro ciklostilitaj, grandformataj, 20-paĝaj, kun interesaj popularaj artikoloj pri gravaj temoj socialaj kaj sciencaj. Svarmas ankaŭ diversaj difinoj kaj propozicioj pensigaj, iam paradoksaj, plej ofte de la redaktanto. Estas ĝua tralegi la kajeron, sed oni sentas mankon de programo. Krom pledo por malmulte manĝi kaj dormi antaŭ nokto-mezo; sed efikeco de tiaj proponoj estas dubinda.

Tähtivaivas, finna scienca revuo por astronomio enhavas en 16-paĝa numero unu paĝon, sur kiu ĝi donas esperantlingvan resumon de la finnlingvaj artikoloj. Redaktoro de la revuo estas profesoro Y. Väisälä el universitato en Turku. (Norvega Esperantisto, septem.)

Kansai Universitato, E. K. Suitasi, Osakafu, (Japanujo) aperigis sian »Deklaron de la paco« la 20. VI. 1950 esperantlingve. »Ni kriis al homoj de la tuta mondo, ke ni forĵetu atombombon.«

Pri Max Nordau, kies centa datreveno de naskiĝo en 1949 estis rememorigata de universitatoj en Parizo, Buenos Aires, Jerusalemo kaj aliaj, verkis informan artikolon en »Malgranda Revuo« (3-1950) J. Kohen-Cedek el Jerusalemo. Li akcentas signifon de tiu ĉi ĵurnalisto, poeto, romanverkisto, sociologo, filozofo, viro, kiu ĉiam klopodis plibonigi

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

1950

ROČNÍK V JARKOLEKTO

Vydavatel: Svaz esperantistů Československé republiky
Eldonanto: Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka respubliko

Redtgovali

Redaktis

Dr Stan. Kamarýt,

Rudolf Hromada, Ota Ginz

PRAHA 1950

Tiskla knihtiskárna Orbis 06, Praha, presis

TABELO DE ENHAVO

ĈEĤAJ ARTIKOLOJ

Th. R. Ĉejka: Josef Krumpholz zemřel (J. Krump-holz mortis)	18
Dr. J. Fousek: Úvahy realistické a estetické (Konsi-deroj realismaj kaj estetikaj)	65
O. Ginz: M. Gorkij o esperantu	73
Adolf Malík: K dnešním dnům (Por tagoj ho-diaŭaj)	33
Mírové hnutí ve světě (La porpaca movado en la mondo)	25
Proslov předsedy na VIII. celostátním sjezdu čs. esperantistů v Brně (Diskurso de la prezidanto en la VIII tutŝtata kongreso de čs. esperantistoj en Brno) 27.—29. V. 1950	41
S. K.: Ctnost trpělivosti (Virtu de pacienco)	1
Zikmund Skyba: Veš mezi nehty (Pediko inter du ungoj)	57
Julie Šupichová: Co jsme chtěli a čeho jsme dosáhli (Kion ni volis kaj kion ni atingis)	49

ESPERANTAJ ARTIKOLOJ

J. Bendová: Juneco kaj paco	65
K. Čapek-J. Vondroušek: Aleksandro la Granda	1
M. Dušková-M. Lukáš: Letero el Dobříš	66
Julius Fučík - R. Hromada: Testamento	18
V. Káňa - M. Lukáš: Ču oni povis iam supozí	66
A. Kofman: Bone kaj malbone	15
Ad. Malík: Ne ekzistas homo pli blinda	33
La porpaca movado en la mondo	25
Maksimoj de Rochefoucauld	55
O. G.: Pri arto traduki	20
Okaze de la 21-a de decembro	73
U. E. A. Petri: Pri budaismo	2
Ed. Privat: Post la milito	56
Tolstoj kaj Esperanto	78
Zamenhof kuracisto	78
S. K.: Unuaj libroj pri Esperanto	24
Lingva Komitato kaj ĝia Akademio	32
Teorio de artefaritaj lingvoj	39
Universala Esperanto-Asocio	55
Resuma historio de la Esperanto-movado 63, 72, 79	58
Du internaciaj kongresoj esperantistaj	26
Ad. Staňura: Propono de Esperanto-stenografio	59
W. Solzbacher: Transdono de UEA-petskribo al UNO	3
J. Šupichová: Novaj libroj	16
Tokuchi Todo - J. Kimra: Du sake-vendistoj	

POEMOJ

K. Kalocsay: Kisoj	56
Karolo Píč: Pluvus	13
Putrinta Pompo	5
Raymond Schwartz: Nur epitaŭ atestas	53
ĝia ĉeĥa traduko de Miloš Lukáš	67
Fráňa Šrámek - Rud. Hromada: Amanto en aprilo	74
Tomáš Pumpr: Popolaj kantoj en Esperanto-adapto	19, 51, 67
E. Urbanová: Stranga kaptiŝo	45
Valda Vinař: Voĉoj el malproksimo	74
L. L. Zamenhof: Mia penso	15

LINGVO

Traduka tasko 25	6, 35
26	20, 35
27	36, 63
28	63, 77
29	77

K. Píč: Ilia belsoneco	36
W. Solzbacher: Kion ni manĝu	20

MOVADO

Kongreso Parizo	11, 23, 58
» Munkeno	71
» Torino	11, 59
» Brno	14, 17, 31, 43
Financa raporto 1949	54
Listo de Centra Komitato Asocia	54
Ekzamena komisiono	5, 62, 63, 75
Someraj kursaroj: Doksy	14, 23, 31, 38, 48, 60
Karlovy Vary ..	23, 31, 38, 48, 61
Rožnov p. R.	31, 38, 48, 61
Svit	48, 62
Radio	4, 11, 23, 30, 43, 62, 71
Verda stacio	3, 4, 21, 34, 43, 62
Kroniko enlanda	3, 21, 43, 60, 57, 75
Ni legis	6, 21, 37, 52, 76
Ricevitaj libroj	10, 46
Korespondi deziras ..	13, 37, 48, 54, 63, 71
Ellerni	15, 24, 32, 39, 55, 64, 72, 80
České listy o esperantu (Ĉeĥaj gazetoj pri Esperanto)	13, 37, 70, 79

Lokaj informoj: Bohumín 78, Boskovice 8, Brno 8, 22, 44, 69, 78, Brno-Židenice 8, 22, Břeclav 22, 44, 69, Bruntál 8, České Budějovice 22, 44, Česká Skalice 44, Děčín 22, 69, 78, Gottwaldov 22, 44, 69, Hradec Králové 8, 23, 44, 69, 78, Cheb 8, 23, Chlumec n. C. 44, Chomutov 8, Jablonec n. N. 8, 44, 69, Jeseník 8, 44, Jihlava, 8, 44, Karlovy Vary 8, Karviná 23, 44, Kladno 8, 23, Kolín 8, 23, Kopřivnice 8, 23, 69, 77, Lanžhot 8, Letovice 9, Liberec 44, Lipt. Hrádek 23, Litovel 9, Litvínov 9, 77, Lutín u Ol. 9, Mariánské Lázně 23, Moravský Krumlov 9, Moravská Třebová 23, Most 9, 44, Náchod 77, Nejdek 23, Nový Bor 23, Nový Bydžov 44, Nýřany 69, Olomouc 9, 44, 69, Opava 78, Ostrava 9, 23, 44, 69, 78, Pardubice 23, 78, Pěnčín u J. 9, Plzeň 9, 45, Praha 9, 45, 69, 78, Prostějov 45, Přerov 9, Příbor 9, Púchov 70, Rokycany 9, 23, 45, Rosice 9, Rychnov n. Kn. 78, Stěžery 9, Strakonice 9, 78, Svit 45, Tanvald 45, Trenčín 9, 45, 70, Trnava 70, Trutnov 9, 70, Třebíč 9, Třebíč-Borovina 9, Týniště n. O. 23, Uherské Hradiště 9, Úpice 10, Ústí n. L. 45, Určice 70, Vejpřty 23, 45, Velké Svatoňovice 78, Veselí n. M. 10, Vsetín 45.
--

Esperantista vivo: Austerlitz 12, Bočková 23, Budayová 63, Dominik 47, Erbenová 47, Ezechel 12, Halža 31, Havasová 63, Havaš 63, Holeček 31, Horsáková 63, Hromada 67, Janda 77, Jašek 47, Kaiser 12, Kastner 12, Kaštanová 71, Kotrba 12, Kovář 71, Kraft 71, Kremer 12, Kremerová 31, Krumpholz 18, Křižanovský 47, Kubala 47, Kučera 38, Kučerová 12, Kuželová 71, Malík Ad. 60, Malík Ant. 12, Marečková 23, Maurová 63, Panovský 63, Prášil 23, Procházka 60, Reiser 12, Rosa 12, Rýznar 12, Řebíček 71, Slavík 75, Schwetter 63, Springer 38, Vörösmarty 63.
--

BILDOJ

Ekspozicio en Brno-Židenice 12, Friedrich 5, Hromada 67, Kongreso en Brno 53, Krumpholz 34, Malík 60, 7 Ripozejo de D-ro Esperanto en Kopřivnice 69, Voĉoj el malproksimo 74.

ALDONOJ

Raporto pri agado 1949.
Kunsidoj de la VIII-a ĉs. kongreso.

situaciojn de la homaro. »Kiel morkritikisto li senkompate vipis ĉiujn anomaliajn aperojn kaj patologiajn simptomojn en la kulturvivo. La eŭropan kulturon li perceptis kiel integre unuspecan historiprodukton kaj tial postulis ĝian politikan unuiĝon.« Nordaŭ pleje influis publikan opinion sur la limo de la 19-a kaj 20-a jarcentoj. Ni estas danke-
maj al Kohen, ke li rememorigis al ni verkon de tiu viro. Ni memoras ankoraŭ liajn artikolojn ĵurnalajn. Antaŭ kvindek jaroj ili tre plaĉis al nia fantazio kaj nia nekontenteco kun la tiama mondo. Similis al karkado piroteknika; strange, ni ĉion forgesis el tiu ĉi tiom amita aŭtoro; certe ankaŭ li kulpas. Versimile tial, ĉar mankis al li konkreta programo; ĉio estis kritiko. Kio restis el liaj celadoj estas ŝtato Izraelo; ĉar en tiu sfero li programon havis. — Kohen aldonis al sia artikolo ankaŭ tradukon el Nordaŭ, fragmenton el lia verko »Kio okazos post la morto«. Nordaŭ primeditis ankaŭ problemon de la postmorta vivo, kiam Flamarion prezentis al li spiritismajn vidmanierojn. Nordaŭ venis al absolute negativa sinteno al spiritistaj hipotezoj. La tradukita fragmento tre trafe argumentas, ke la postmorta vivo eĉ ne estas dezirinda. Certe multaj legis tiujn du paĝojn kun konsento. Tamen: kiom da individuismo nun jam tre fremda, nekomprenebla al la nuntempa leganto!

Originalan rakonton humoraĵan »La dubinda venĝo« de nia membro Ŝtěpán Urban aperigis »Esperanto« el novembro. Ni gratulas al la aŭtoro pro la bonaj stilo kaj lingvaĵo.

El popola Ĉinio, Monata Informa Bulteno de Fremdlingva Eldonejo, 26 Kuo Hui Chieh, Peking, aperas regule ĉiumonate, 8 paĝoj ĵurnalformataj. En ĉiu numero estas tre rimarkindaj lignogravuraĵoj, majstreco de ĉinoj en tiu fako estas ja konata. Ankaŭ la bona kvalito de lingvaĵo meritas rimarkon. La artikoloj mem estas tre informaj priskribante la situaciojn en la popola Ĉinio kaj pledante por tendencoj de la nova popola registaro. El la septembra numero mi precipe substrekus artikolon pri Tajvan (Formoso).

Filmo pri la VIII-a ĉeĥoslovaka Esperanto-kongreso en Brno 1950 farita de ges-oj A. kaj Sl. Konečný, estas pruntata al niaj grupoj kaj kluboj. Skribu al nia oficejo. Ĝi estas 8 mm-filmo, daŭras 15 minutojn.

Prispevek 1951. — Ĉlenové místních odboček platí pokladníku odbočky. Ostatní členové použijí bílancí složenky, kterou vyplní takto: č. 9602 Svaz Esperantistů ČSR, Praha. Prispevek činí 100 Kčs.

LINGVO

Prékald 28. textu:

La bazan direktolinion¹ por laboro de la altlernejoj² la prezidento³ respublika Klement Gottwald fiksas⁴ en la Naŭa kongreso de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio per la vortoj: »La spertoj nin instruas, ke por la konstruado de socialismo la laboranta popolo devas (por si) krei kaj eduki la propran inteligentularon,⁵ devenantan el ĝia mezo kaj kunigitan⁶ kun ĝi klase kaj ideologie.« En la sekvado de ĉi tiu direktolinio niaj altlernejoj eniras en decidan etapon de sia evoluo.

La ĉefa tasko dum la realigado de la altlerneja leĝo kaj de la novaj planoj de studado,⁷ la ĉefa ero de la ĉeno⁸ tenota⁹ en laboro de la altlernejoj, estas la postulo,¹⁰ ke la nova altlerneja inteligentularo estu, laŭ la vortoj de prezidento Gottwald, edukata »en la spirito de la plei progresema mondkoncepto, en la spirito de la dialektika kaj historia materialismo, en la spirito de la marksismo kaj leninismo«. El tio rezultas,¹¹ ke ĉiu scienco,

kies (ek)konaj estas instruataj en niaj altlernejoj, devas esti firme apogita sur la dialektika materialismo, por ke ĝi estu efektive¹² vera scienco.

P o z n á m k y: ¹ direktivo, direkto, aginstrukcio; **ne-**tendenco = daŭra inklimo, emo al... ² ne: superaj lernejoj = vyšší školy ³ proĉ: respublikestro, když prezidento je slovo nejen esperantské ale i mezinárodní? ⁴ starigis, difinis ⁵ proprajn inteligentulojn, intelektulojn. Inteligent(eco) = inteligence (vlastnost): = plenumi sian taskon kun inteligenteco ⁶ kaj ligitan kun ĝi. Nikoli: kunigita. Tvary na -iĝita jsou nesprávné, všechna slovesa na -iĝi jsou nepřechodná ⁷ studplanoj ⁸ ĉenero ⁹ prenota, kiun (ek)preni, teni estas necese ¹⁰ ne: pretendo = nárok ¹¹ sekvas ¹² fakte ¹³ plenumado de ĉi tiu instrukcio.

Prékald zaslali: Marica Adamcová, Brno; M. Bahula, Ostroh; J. Baudyš, Daliměřice-Turnov; E. Belá, Tanvald-Šumbruk; Aug. Blahutka, Vsetín; E. Klubo (Libuše Jonášová), Ústí n. L.; Vl. Kočvara, Rokycany; Al. Kozárek, Skrbeň; Jar. Kuzník, Opava; Jos. Lederer, Šluknov; Ad. Macek, Bulharv; G. Menšík, Plasy; Jar. Mráz, Rokycany; Boh. Němeček, Dobřany; Jos. Novák, Horatice; Ant. Paul Domažlice; Dr. R. Pawlik, Ostrava; M. Racek, Plzeň; Št. Šumavanská, Praha, celkem 18 překladů. Děkuje všem účastníkům za spolupráci. (Hm)

29. text k překladu.

Slavný den ustavení Světové rady míru.

Ne-mrtelnými slovy Julia Fučíka: »Lidé, měl jsem vás rád. Bděte!« skončil ve středu dne 22. listopadu v 18,30 hodin II. světový kongres obránců míru ve Varšavě.

Fučíkův odkaz citoval předsedající Pietro Nenni, když byl oznámil zástupcům národů z celého světa, že »největšímu hrdinovi odboje«, našemu Juliu Fučíkovi, byla udělena první mimořádná mezinárodní Cena míru.

Celé shromáždění, více než 2000 mužů a žen ze všech světadílů, povstalo a utiřilo památku Julia Fučíka dlouhotrvajícím potleskem.

Tak skončila zasedání slavného varšavského kongresu, na němž delegáti zastoupených národů učinili rozhodnutí světodělného významu. Přijali Manifest národům celého světa a výzvu, adresovanou Organizací spojených národů, která obsahuje požadavky kongresu obránců míru.

V Manifestu národům celého světa kongres odsuzuje válku a vyslovuje naději, že Organizace spojených národů se vrátí k zásadám, které jsou s to zajišťit mír mezi národy. Právě se v něm, že »Mír musí být vybojován«.

V devíti bodech výzvy Organizací spojených národů žádá II. světový kongres obránců míru okamžité zakončení nepřátelských akcí v Koreji, odvolání cizích vojsk a mírové vyřešení konfliktu Radou bezpečnosti v jejím zákonném složení a za účasti korejského lidu. (Rudé právo, 23. XI.)

Prékaldy prosíme do 14 dnů po obdržení čísla.

LERNU ESPERANTON

de

Daniel Quarello

Katedro de supera kulturo pri Esperanto.

- I. LERNU ESPERANTON
- II. KOMPLEMENTOJ DE L'SUBSTANTIVO.
- III. KOMPLEMENTOJ DE L'VERBO.

Prezo afrankite: Kčs 15,80 po volumeto
ĉe la Librovendejo de EAĈSR
(Nun estas bedaŭrinde la tuta provizo disvendita. Ni anoncos alvenon de nova livero.)

LOKAJ INFORMOJ

Bohumín. E. K. petis la urbon nomi la aleon ĉe la Esperantomonumento Aleo de Dro Zamenhof. La antaŭmilita monumento (anstataŭita jam de nova) estis hazarde trovita kaj ĝi estos lokita en alia urbo de la regiono.

Brno. — Komenského osvětová akademie aranĝis en kunlaboro kun la klubo kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Ekde la 2. 10. funkcias kurso por komencantoj en interna urbo por 20 personoj, instruas J. Vondroušek. En Brno-Král. Pole komenciĝis la 9. 10. kurso por 17 progresintoj kaj la 10. 10. kurso por 16 komencantoj. Ambaŭ kursojn gvidas s-ano J. Friedrich. — Por la kursoj varbis 500 afiŝoj dum 14 tagoj kaj kelkaj pagitaj gazetoncoj.

Necesas menci i ankaŭ la kluban vivon. La kunvenojn regule vizitas 50—70 personoj, la programoj estas tre kontentigaj kaj ofte alportas agrablajn surprizojn. La 10. 10. okazis prelego de s-ano Ivan Kunčev pri Esperantomovado en Bulgario, sed fakte okazis brila bulgara vespero, en kiu partoprenis per klarneta solo fama bulgara virtuozo kaj bulgaraj kantistoj prezentis bulgarajn naciajn kantojn, ankaŭ en esp. traduko, kaj sekvis recitado ĉefe el Ĥristo Botev. — Filmo de gesinjoroj Konečný pri la 8-a ĉsl. kongreso esperantista, projekciita la 17. 10., estas valora dokumento pri la kongresaj tagoj. — Poezia vespero, okazinta la 24. 10., kaj melodramoj, estis vere artisma evento; ni povas diri, ke ĉiu rolanto eminentiĝis en plej alta grado, talentuloj multiĝas kaj maturiĝas kaj la laboro de operkantistino V. Borská montras la plej belajn rezultojn. Kaj brilaj pianaj akompanoj aŭ solludoj de prof. V. Scheiber estas konataj kaj ravas ĉiun. (J. V.)

Brno-Tuřany. — Kurso en kunlaboro kun Kleriga Amikaro depost la 4-a de oktobro, instruas J. Hoffner 17 p.

Děčín. — Kurso komencula depost la 20-a de septembro, gvidata de s-oj Růžička kaj Babička laŭ Kilian-lernolibro kaj laŭ Ĉe-metodo por 25 p.

Hradec Králové. — La Hromada-Vespero de la E. K. la 4. XI. en salono de Grand-hotelo estis travivaŭto edifanta. Prezidanto de la klubo J. Dolanský tre trafte skizis disvolvon de la laboro de Rudolf Hromada, regiona peranto Pytloun en sia diskurso akcentis la fundan transformiĝon de la socio, kiun ni ĵus travivas. La revoluciaj ŝanĝoj sekvantaj el ŝtatigo de privataj entreprenoj envicigis la ĉeĥoslovakon popolon en la tendaron de la paco. Ĝi transportis nin sur horizonton, sur kiu ni povas libere disvolvi pozitivajn kaj kreantajn valorojn de la kulturo kaj arto. Nia respubliko fariĝis efektive popola kaj marŝas al socialismo. Poste sekvis arta programo.

• Z. Matyková deklamis (sian Soneton, Kristnaskan vesperon) kaj dancis Smetana-valson, MUC. St. Váňa deklamis el Bezruč, prof. Dana Motlová piano-ludis Smetana-fantaziojn je popolaj kantoj, MUC. M. Růžička kantis el Smetana kaj Fibich, J. Dolanský legis el Fučík-libro Raportaĵo verkita en pendumila maŝo, J. Sucharda deklamis Perdita paradizo de Machar, Eva Suchardová Virino kaj li unusola kaj La amanto en aprilo de Fráňa Šrámek, prof. Karel Hrzěl violonludis Bartoš-romancon, Paderewski-menueton, Wieniawski-La Champêtre. Klarnete ludis Fr. Tuch Pierné-Kanzoneton, dialogojn el Krakit kaj el Somero prezentis E. Suchardová kaj J. Sucharda. Piane akompanis H. Bydžovská, M. Hrzelová, D. Motlová. Esperanto-tekstoj estis ĉiuj de Hromada. Krom unu: improvizitaj versoj de prof. Lukáš rimataj al Hromada, deklamitaj de la aŭtoro mem.

En la fino R. Hromada en mallonga parolado rememorigis pli ol 40 jarojn travivitajn en servo al Esperanto kaj amikojn, kiuj laboris kun li, Bouška kaj Kamarýt ekde 1908, Ginz ekde 1920, plie lia edzino, kies komprenemo kaj pacienco estis la plej grava apogo de lia laborado. Profunde kortuŝitaj estis ĉiuj ĉeestantoj.

En E. K. Brno parolis, la 7. XI. 50, pri la laboro de Rud. Hromada ĝia prez. Jos. Vondroušek. Specimenojn de la tradukoj prezentis: S-ino M. Adamcová: Amanto en aprilo (Fr. Šrámek), F-ino Chlubnová: Kluzo (de Fr. Šrámek) kaj Barcarola (de Jar. Vrchlický), s-o Kovář legis parton el Reportaĵ de Julius Fučík.

En E. K. Praha, la 15. XI. 50, parolis ĝia prez. Jar. Šustr, Ruĝa floro de Bezruč kaj Eklogo V. de Vrchlický recitis F-ino Eva Nývltová. Prof. Vitič kantis du kantojn. Sekvis prelego de Hromada pri oftaj eraroj de ĉeĥaj esperantistoj, kaj kiel eviti ilin.

Kopřivnice. — En Uzina Laborlernejo ROH de Tatra n. e. komenciĝis kurso de Esperanto la 2-an de novembro, inter 16 diverstemaj kursoj. Gvidas Rud. Zanáška, laŭ Ĉe-metodo.

Litvínov. — En aŭgusto festis loka grupo unu jaron de sia ekzisto. Raportis pri tio longa artikolo en Výstavba el 18. VIII. 1950. La 24. IX.—3. X. okazis propaganda ekspozicieto. Dimanĉon la 24. IX. okazis regiona konferenco, kiun partoprenis el nia Centra Komitato Ant. Slanina. Adreso de la grupo: I, Školní 646.

Náchod. — Kurso en gimnazio por 30 gestudentoj, gvidata de prof. Jan Filip.

Opava. En la gimnazio 10 p. instruas Dumbrovský. En Vyšší hospodářská škola (iama Komerca akademio) 27 studentoj aliĝis al kurso. Esp-istoj lokaj partoprenis en du labor-brigadoj kaj la gajnitan monon dediĉis al propagandaj celoj.

Ostrava Slezská. Interes-rondeton en meza lernejo Na Záměstí vizitas 20 infanoj 14 jaraĵ. Instruas D. Kočvara laŭ Kilian-lernolibro, de I. X.

Ostrava I. Junulara sekcio gvidas kurson por 20 komencantoj, instruas M. Neuwirth. Junulan kurson superan gvidas por 12 p. L. Kyselý kaj D. Kočvara, laŭ prelegoj de Hromada en Rožnov.

Ostrava I. Kurson por 12 progresintoj gvidas Vl. Slaný.

Ostrava-Vitkovice. Kurson por 25 komencantoj en Mašinfako de Ferfabriko gvidas Arn. Hojdys laŭ lernolibro Blaha.

Ostrava-Zábřeh. La loka klubo aranĝis la 29. X. esp. ekspozicion (kun multaj raraĵoj) en rest. Eliáš. Kunvenoj samloke ĉiujajde.

Pardubice. — Nova kunvenejo de E. K. »D-ro Schulhof« estas Dům odborů 1800, ĉiuvendrede je la 19 h.

Praha. — Programo de kunvenoj de la E. K. (ĉiumerkrede je la 20 h. en Restoracio Šumavská, II, Štěpánská 3): 15. XI. Diskurso okaze la 60-a naskiĝtago de Rudolf Hromada. Prelego de Hromada: Pri oftaj lingvaj eraroj kaj kiel eviti ilin (ĉeĥlingve). Rememoro pri Tutmonda Tago Studenta (La Junularo). — 22. XI. Naskiĝtago de prezidento Klement Gottwald (Jar. Mařík). — 29. XI. Dua parto de la Hromada-prelezo pri la lingvaj eraroj. — 6. XII. Nikolao-vespero. — 13. XII. Zamenhof-vespero. — 20. XII. Filma vespero. — 27. XII. Radio-amikaro. — Antaŭ ĉiu kunveno je la 19—20 h. progresanta kurso gvidata de Ant. Slanina. — En Regiona Entrepreno Vendejaj Domoj n. e. faris preleĝon pri Esperanto s-o Frant. Šupich la 20. XI.; ĝi vekis intereson inter pli ol 40 geoficistoj.

Rychnov n. Kn. Kurso por kun 20 partoprenantoj komenciĝis la 16-an de oktobro, gvidata de Eva Suchardová laŭ Ĉe-metodo. La 19-an de okt. prelego pri internacia lingvo fare de Jar. Dolanský.

Strakonice. — Kurso komencula depost la 17-a oktobro ĉiumarde je la 19—21 h. en la gimnazio, aranĝata de la Distrikta Kleriga Konsilantaro por 37 p., gvidas Jan Blažek (ul. Sv. Čecha 491).

Velké Svatoňovice. — Kurso por junularo, 15 p., gvidas instruisto K. Kopecký.

České listy o esperantu

»Ne idea, ale nástroj«, praví o esperantu správně dopisovatel Práce Ruda Kolář v dlouhém článku 16. VIII. 1950 v karlovarském vydání. Citujeme z něho: Kosmopolitismus zklamal. Z toho vyplývá, že teprve pak se všichni staneme bratry, až zničíme vykořisťovatele na celém světě, až všude si bude vládnout pracující lid. Proletáři všech zemí jsou našimi bratry a kapitalisté, imperialisté byli a zůstanou našimi nepřáteli přes všechna krásná hesla. Proto my, čs. esperantisté, nebudeme používat esperanta k sbratření lidstva, nýbrž jako praktického dorozumivacího prostředku mezi pracujícími všech zemí tam, kde nám naše krásná česká řeč nestačí. Budeme ho používat jako nástroj k prohloubení třídní uvědomělosti našich kamarádů-dělníků v kapitalistických zemích a jako zbraně v boji o zachování a utužení míru. Zdravý proletářský internacionalismus, podání pomocné ruky všem pracujícím celého světa v jejich boji za odstranění kapitalistické nadvlády, pomoc utlačovaným koloniálním národům, musí být naším hlavním úkolem.

Užitečná dovolená. Svaz esperantistů uspořádá také letos na Máchově jezeře čtrnáctidenní kursy esperanta pro začátečníky a pokročilé. Vyučují zkušené esperantisté. Ve volném čase konají kursisté výlety do okolí. (Svobodné slovo, Liberec 23. VII.)

Výstava na nádraží. Dobrý nápad měli žáci čtvrté národní školy v Děčíně IV. Uspořádali výstavku výkresů v čekárně na děčínském nádraží. Kromě jejich prací spatří tu však cestující také výkresy dětí z Japonska, Finska, Maďarska, Anglie, Francie a jiných zemí, které získala škola za pomoci esperantského klubu za výkresy svoje. Právě tak se obdivují výtvarům našich dětí naši zahraniční přátelé, což potvrzují četné dopisy z ciziny. (Zeměděl. noviny severočeské, 8. VIII.)

O Karlových Varech v esperantu. Vydavatelský odbor ÚRO při JNV v Karlových Varech vydal v několikatisícovém počtu výtisků prospekt o Karlových Varech v esperantu, jehož text zpracovali karlovarští esperantisté a vhodně ilustroval karlovarský kolektiv výtvarníků. Prospekt, pojednávající o dějinách Karlových Var, významných hostech z řad literátů, umělců, vědců, státníků a politiků našeho národa i návštěvníků z ciziny, o léčebných podmínkách a lékařských indikacích, jakož i o kulturním a společenském životě Karlových Var, byl rozeslán esperantisty v kraji dopisovatelům, klubům a esperantským svazům v celém světě a je stále opětovně žádán četnými zájemci z ciziny. (Čs. lázně a zřídla, Praha 31. VII.)

SCIIGOJ

Esperantisto Slovaka havas novan adreson: Turč. Sv. Martin, Slovakotour.

Esperantista poŝkalendaro eldonata de la E. K. en Hradec Králové ne aperos en 1951.

Fotografajo de raketoj el Venezia nokto sur Ŝtrbago dum la Somera E-Kolegio en Svit estas ricevebla po 10 Kčs plus afranko de Anna Šterbáková, tech. odd. en Svit.

La redaktanto dankas al ĉiuj, kiuj helpis lin dum la pasinta jaro, precipe al tiuj, kiuj sendadis sciigojn pri agado en siaj lokoj. La rubriko Ellerni trovis ĝeneralan aprobon. Ni klopodis, ke ĝi liveru materialon precipe studan, ke ĝi fariĝu speco de kurso por progresantoj. Tial ni en la venonta jaro daŭrigos en tiu ĉi rubriko kaj ni klopodos doni en ĝi bildon de evoluo de nia lingvo precipe per specimenoj el diversaj epokoj de nia literaturo.

Bude vydán Soubor spisů presidenta republiky Klementa Gottwalda, celkem o 11 svazcích. První svazek vyjde v listopadu, druhý v prosinci t. r. Další svazky budou následovat v různých intervalech. Vydávání potrvá několik let. Závažné přihlášky přijímá nakladatelství Svoboda v Praze II, Na poříčí 28—34.

V SSSR vychází druhé vydání velké sovětské encyklopedie, vrcholného díla sovětské vědy, jehož redakcí byl pověřen akademik S. J. Vavilov. Encyklopedie obsáhne na 100.000 hesel. Celkem vyjde 50 svazků, z nichž první došel právě do Československa. Ostatní díly vyjdou během šesti let. Cena prvního svazku v celoplátěné vazbě je 475 Kčs. Svazky budou vydávány jednotlivě jen na základě závažné přihlášky k odběru celé encyklopedie. Závažné přihlášky přijímá Kniha lidu—Družstvo pro ústřední distribuci knih, Praha XVI, Nádražní 37.

Velmi doporučujeme svým členům, aby navrhli tyto významné edice k odběru knihovnám, na něž mohou působiti, i aby se sami hlásili k odběru. Získají do svých knihoven díla ceny nepomíjející.

ESPERANTISTA VIVO

Mortis František Janda el Praha, eksdirektoro de la hotelo Jindřišská Pasáž, la 9-an de novembro 1950, entombigita la 11. XI. Na Volárně ap. Velký Osek. Li estas membro de E. K. en Praha, ĝia iama vicprezidanto, homo komplezema, afabla kaj laborema, ĉiam preta helpi. Li ne estu forgesita!

Edziĝo. Samideanino Mária Rosová, filino de s-ano Paŭlo Rosa, prez. de SES, kaj Ing. Dušan Hrivňák la 28. X. 1950 en Bratislava. Sinceran gratulon!

Yvzývame členstvo, aby nerozŝirovalo a nepoužívalo nálepek a plakátů, jež vydalo »Koro esperanta« v Brně (J. Dittrich). SEČSR, Ústřední výbor.

Librovendejo de EAĈSR ofertas

Lad. Krajíc: Učebné texty pro kursy (2,50)	20,—
J. Šupichová: Hovoříme esperantsky (2,50)	28,—
J. a K. Filipové: Velký slovník česko-esperantský (11,—)	390,—
H. K. Bouška: Esperanto - jednotné jazykové pojítko národů. Krátké uvedení do esperanta. 10 ex. ..	8,—
E. E. Collinson: Esperanto a jeho kritikové	2,—
Dr. St. Kamarýt - Dr. T. Pump: O zkouškách z esperanta	10,—
Dr. T. Pump: Česká a slovenská literatura v esperantu	2,—
Esperanto-Schlüssel (německý Klíč esperanta)	1,—
J. a K. Filipové: Kantareto (2,50)	45,—
Teksto de kantoj, prezentitaj dum Esperanto-kongreso en Brno (por klubaj artesperoj)	6,—
Multobligitaj tekstoj de operoj, disaŭditaj de Verda stacio en Praha:	
Najado	20,—
Vendita fianĉino	10,—
Aliĝilo al Esperanto-kurso 100 ekz. (4,—)	35,—
Atesto pri kursfina ekzameno	4,—
Propaganda afiŝeto multkolora	3,—
Kartona afiŝeto (1,50)	5,—
Propaganda afiŝo 41×30 cm - kun libera spaco por anonco de kurso ktp.	2,—
Stacidamo tabulo lada ESPERANTO-INFORMO, uzbla ankaŭ por klubejo (6,—)	100,—
La sama, iomete difektita (6,—)	50,—
Leterpapero kun koverto	1,—
Leterpapero kun koverto aerpoŝtaj	1,50
Poŝtkarto	—,30
Poŝtkarto kun portreto de Zamenhof (Bartošik)	1,—
Novjara poŝtkarto de Bartošik	1,—
Emailita ŝildeto ESPERANTO PAROLATA 14×5 cm (4,—)	30,—

Senpage al eksterlando:

Konstitucio de Ĉeĥoslovaka respubliko
Lerneja reformo en Ĉeĥoslovakio.

Al la prezo aldonu afrankon, notitan inter krampoj. Kiam ne estas notita, tiam minume 80 helerojn. Plej simpla mendo per poŝta pagilo nro Č 12.371 Svaz esperantistů, Praha.

Resuma historio de la Esperanto-movado (Fino.)

La periodo de organiza disfalo kaj de florado literatura (1934—1939). Naciaj societoj kreis Internacian Esperanto-Ligon sidantan en Rickmansworth apud Londono kaj UEA klopodis reveni al sia origina formo. En Germanio Esperanto estis malpermesita. En Italio ne estis permesite libere kontakti kun fremdlando kaj esti membro de eksterlandaj societoj. En Hispanio furiozis intercivitana milito, en Portugalio Esperanto estis malpermesita. En Sovetio depost 1937 la movado ĉesis.

Dum tiu organize malĝoja stato floris mirinde la literaturo. Eldona agado de Literatura Mondo (fondita komence en 1922, post sia refondo en 1931 fare de Vilmos Bleier) fariĝis modelo ankaŭ por aliaj libro-eldonantoj. La redaktanto Kolomano Kalocsay sciis teni la redakton de la revuo kaj la redaktadon de la eldonejo sur alta artnivelo. Imitis la eldonmanieron kaj librokvalitojn pluraj aliaj libroeldonantoj. Ankaŭ SAT-eldonejo liveris al leganta esperantista publiko rimarkindajn librojn. Kvazaŭ prepariĝus en nia literaturo periodo klasikisma analogia al tiaj periodoj en naciaj literaturoj.

Kaj stranga afero: Kvankam organiza skemo de la movado estas en ne tro bona ordo, tamen raportoj pri la movado aperantaj tiam en la Jarlibro de la Internacia Esperanto-Ligo povis en j. 1937—1939 informi pri kelkaj gravaj agnoskoj de Esperanto fare de oficialaj aŭtoritatoj en pluraj landoj. Tiuj ĉi agnoskoj kaj la florado literatura povis vekti diversajn esperojn. Oni povis eĉ studi eblecojn de propagando ĉirkaŭ la amasoj.

Dua mondmilito ĉesigis denove tiun ĉi interes-kaj esperplenan situacion.

Dua mondmilito (1939—1945). La historio ne ripetigis. En ĉiuj landoj sub potenco de Germanaj naziistoj Esperanto estis malpermesita. Sed en la cetera mondo la movado ne ĉesis dum la milito. IEL en Anglujo daŭrigis sian vivadon, enkasigadis la kotizojn kaj eldonadis librojn. En Brazilo ricevis la naciaj esperantistaj kongresoj tre oficialajn apogojn. En Usono daŭre vivtenis sin Amerika Esperantisto. Tial post venko super Germanujo la movado povis tre baldaŭ restariĝi.

Tamen periodon postmilitan oni ankoraŭ ne povas karakterizi. La konsisto de la socio tiam transformiĝis, ke ankaŭ esperantismo devas adaptiĝi tre funde. IEL kaj UEA kunfandiĝis 1947 sub glora nomo de Universala Esperanto-Asocio. SAT daŭrigas sian ekzistadon. Sed malfacileco de interlandaj rilatoj estas grava obstaklo por nia movado.

Několik rčení.

Dělal hloupého — Li ŝajnis sin stultulo.

Liĝvati sama sebe — Sin mem indulgi.

Zachmuřil se — Li malsereniĝis.

Použít příležitosti — Kapti la okazon.

Stýkat se s někým — Interrilati kun iu.

Zámožný člověk — Bonhávulo.

Situace byla napjata k prasknutí — La situacio estis eksplode streĉita.

Šastnou náhodou — Bonŝance.

Veršování se jí nedaří — Versfarado ne prosperas al ŝi.

Zadržeti posměšný úsměv — Lippremi mokan rideton.

Melodie včera slyšená nejde mi z hlavy — Melodio hieraŭ aŭdita ne volas elkapiĝi.

El la »Verda Biblio«. Ĉapitro V.

1. En tiu tempo granda kaj terura uragano ekskuis la mondon, kaj la reĝoj de l'mondo ekbatalis inter si. 2. Unu reĝo diris: tiu terpeco apartenas al mi, kaj la alia reĝo diris: ne, ĝi apartenas al mi. 3. Do la reĝoj de l'mondo deklaris: venu kaj ni ludu militon. Ni fariĝos malamikoj. Ni sendos niajn homojn sur grandan placon kaj ili luktu inter si. 4. Kaj tiel fariĝis. Milionoj da homoj iris sur la placon por lukti inter si. Kaj tiu ludo havis abundegon da sensaciaj momentoj. 5. Kaj psikozo de tiu batalludo kaptis la tutan mondon. Ĉio estis detruita kaj ruinigita, ankaŭ tiuj terpecoj, por kiuj la reĝoj ekbatalis. 6. Kaj la ludo finiĝis post kvar sangaj jaroj, kiel ĉiu ludo: kun larmoj kaj lamentado. Kaj neniu el tiuj reĝoj ricevis la probatalitajn terpecojn, ĉar ekstaris novaj reĝoj, kiuj akiris ilin.

7. Dum la tuta daŭro de tiu batalludo ankaŭ la verda popolo multe suferis. 8. Kaj ĝiaj malamikoj ĝojis jam, ke en tiu ruino kaj ĥaoso ĝi pereos por ĉiam. Sed la Spirito helpis la verdan popolon. 9. La fortika trunko eltenis ĉiujn ventoskuojn, kaj la ombro de ĝia foliaro kovris la etajn efemeraĵojn ĉirkaŭ ĝi. 10. Tiam la ĉefaj viroj de la popolo diris: ni kunvenu kaj konsiliĝu kaj ni organizu la popolon. 11. Ni donu al ĝi fortikan kaj solidan bazon, por ke ĝi povu rezisti malbonon kaj sortobatojn. 12. Kaj la viroj kunvenis en Helsinki kaj multe tie festenis. Ĉar tiaj estas la kutimoj en la verda popolo. 13. Kaj kiam la festenoj finiĝis, en la oka tago de la festo, oni anoncis al la popolo, ke estas starigita interligo. 14. Kaj ĝojis la popolo, sed ĝi estis ĝojo de nesciantoj.

15. Kaj nekonata profeto ekkantis sian kanton plorĝem-, la elegion de Helsinki. 16. Kiel erarvagantaj ŝafoj estas nia popolo. Kompatu ilin, ho gracoplena Spirito! 17. Ĉar en domo de funebro ili sidas, kaj ekstazas de ĝojo. 18. Ilia cerbo estas ebrigiĝita per festaj pompoj, sed la koroj ne vidas la estontecon. 19. Ili faris interligon, kiu disbatos ilin, pacon, kiu militon provokos. 20. Bazon ili konstruas sur sablo, ĉu ĝi povos teni sin firme? Mi ne benos tiun laboron.

21. Kaj kiam la ĉefaj viroj estis aŭskultintaj tiun neindan profetojn, ili tre forte ekkoleris. 22. Kaj ili mortbatis lin sur la sojlo de sia domo dirante: malpacon li semis en nia popolo. 23. Sed la sangomakuloj sur la sojlo estis neforviŝeblaj - kaj ili restis kiel terura signo por la generacio.

V této kapitole satirické knižky jedná Izrael E. Lejzerovicz o prvé světové válce a o smlouvě v Helsinkách r. 1922, která založila jednotnou organizaci esperantského hnutí a trvala 10 let. Autor se narodil 1901 v Lodži, byl zavražděn nacisty 1942. Povoláním novinář a obchodník, byl z neaktivnějších polských esperantistů. Knižně od něho vyšly mimo Verda Biblio ještě překlady An-Ski: Dibuk a Šalom Aš: La Sorĉistino el Kastilio, oba z hebrejštiny.

Proverboj.

Ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme. — Kiu venas plej frue, sidas plej ĝue. — Fasto sen avizo estas agrabla surprizo. — Barelo malplena sonas plej laŭte. — Pli da bruo ol da faro. — Aŭ festo, aŭ fasto. —

Nauĉte se tiemto priŝlovim zpoměti!